

Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

30 (2 / 2000) LEA/G



MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete
inkluzivas la organon
de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE) **La Socialisto**

Ĉu LEA/G «mortos» . . .

Pardonu, gekamaradoj, kiam mi ŝercas pri la uzo de Esperanto. Ĝi estas 'rekomendinda' lingvo por informi pri asociaj malfacilaĵoj, kiuj ne taŭgas por 'fremdaj oreloj'. Nia asocio estas 'sur la vojo' al nepluekzisto.

Mankas novaj membroj! Certe ne estas konsolo, kiam mi ekzemplas, ke saman situacion oni povas trovi en multaj asocioj, eĉ en keĝloklubo.

Nia asocio apartenas al la mondvasta movado de laboristaj esperantistoj. Sed bedaŭrinde, en Germanio el la milionoj da nememstaraj laborprenantoj nur 70 estas membroj aŭ simpatiantoj de nia Asocio. Ĉu junajn homojn ne interesas niaj aktivecoj? Ĉu ili eble ne estas sufiĉe modernaj? Ĉu LEA/G ne atentis la vivmanieron de la nuntempa generacio?

Interalie, kotizaĵo kaŭzas eksmembrigojn. Kiam esperantisto membriĝas en GEA, UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj subite pro senlaboreco mankas mono por pagi kotizojn, la esperantisto devas pripensi, al kiu asocio li preferas ĝiri sian obolon. Li forlasas la aliajn organizojn, unuavice la malgrandajn, do, ankaŭ LEA/G kaj eble S.A.T.

Grizuloj fidele daŭrigas membrecon, sed, bedaŭrinde, tiu grupo malgrandiĝas pro la viva fatala konsekvenco.

Ekzemple: La du konsilantoj, la prezidanto kaj aliaj aktivuloj estas maljunuloj, tamen ili ne ĉesas aktivi. Atingu ili tre altan aĝon!

1. La funkcio de PREZIDANTO estu estonte nur formala. Li havu nur la taskon reprezenti la asocion ekstere, kune kun alia estrarano, kiam necese.
2. Ĉar ni nur tre malfacile trovas kandidaton por la ofico de ANSTAŬANTO de la prezidanto, ni forgesu tiun postenon.
3. La SEKRETARIO estas grava asocia aktivulo. Li faras skriblaboron, korespondadojn ktp. Lian laboron kontrolu konsilantoj.
4. FINANCRESPONDECULO – Jiri Proskovec faras elstaran laboron. Li estas preta daŭrigi. Samtempe li estas S.A.T.-peranto por germanaj S.A.T.-membroj.
5. 1 – 2 KONSILANTOJ
6. Du REVIZOROJ – se mankas unu, iu de la konsilantoj subtenos la laboron.

7. LEA/G-anoj voĉdonu nur per REFERENDUMO.
8. LEA/G-organon *MAGAZINO* bonege redaktas Gary Mickle. Ni esperu, ke li daŭrigos laboron.
9. Preskaŭ ne estas eble aranĝi LEA/G-kongreson. Mi proponas por ebligi, ke niaj membroj kaj simpatiantoj kunvenu en laborista Esperanto-rondo, partopreni ĉe la paskaj kongresoj de nia fratassocio S.A.T.-Amikaro. Mi jam ricevis la JESon de la asocio.
10. Fine mi proponas, ke sub la asocia nomo, aperanta sur leteraj kapoj k.a., aperu en krampoj (Fond. 1956; postulo de la Laborista Esperanto-Asocio kaj de la Socialista Esperanto-Asocio). Ni uzu la emblemon de GLEA – Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj menciu ligitecon al S.A.T.-LEA-komitato.


Krome aperu mencio de la ligiteco kun ASLE – Aŭstria Socialista Ligo Esperantista. Ne timu, ke ĉi tiu aranĝo ne eblas – mi jam faris ĝin kun sukceso.

Jen la emblemo de GLEA:



Ĝustatempe la asocio sendos VOĈDONILON al ĉiu aktiva membro, per kiu estu decidota pri la proponoj. Mi petas, ke jam nun la LEA/G-anoj perletere kritiku la proponojn kaj skribu pri aliaj eblecoj estonte fortigi nian asocion LEA/G.

Salutas vin kamaradece
Via Albert Stephan



Post la finredakto de la supra artikolo de Albert Stephan, la estraro aprobis por ĝenerala uzo la grafike pli modernan emblemon projektitan de Sebastian Hartwig, pro kio la enartikole prezentita emblemo de GLEA estu konsiderata kiel historia. **GM**

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:
Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G) / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)
Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,
(Tel.+Fax: (07802) 90 336)
LEA/G per SAT en TTT:
<http://www.multimania.com/satesperanto/>
Redakcio / Redaktion:
Gary Mickle (GM), Brüsseler Str. 6,
DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),
retadreso / E-mail-Adresse:
101.121591@germany.net
Hans Rodewig (HR), Stammestr. 86D,
DE-30459 Hannover
Albert Stephan (AFS), ĉe la supre indikita
adreso de LEA/G / unter der oben ange-
gebenen LEA/G-Adresse
Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la
redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi
alsendaĵojn.
Redaktofino: varias (kontakto GM sub la
supre indikita adreso)
MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint
vier Mal jährlich;
abonprezo / Bezugspreis 15,- DM
La membrokotizo entenas liveradon de la
bulteno.
LEA/G-konto: Jiri Proskovec
n-ro 9168 434 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)
Represo de materialo permesita, se la fonto
estas indikita.

Asocioj de laboristaj esperantistoj ne estas en bonstata situacio

Komprenible ili ne povos atingi bonstaton por la asocio nur per regulaj kotizoj – bezonataj estas donacoj. Kiam estas sufiĉe granda monsumo, ĝi ebligas plimultigi la asocian kapitalon, kion laboristaj Esperanto-asocioj ege bezonas por efike varbi ĉu por la Esperanto-ideo ĉu por la koncerna asocio mem.

Ne ĉiam la asocio bezonas monsumon por plenumi taskojn, kaj ĝi do parkas la restajon en la asocia konto aŭ en la monujo de la kasisto. Egale ĉu konto ĉu monujo, neniu interezo estas pagata.

Ekzistas kelkaj ebloj por plimultigi asocian havaĵon, sed en ĉiu kazo oni konsideru, ke la mono estu ĝustatempe disponebla, dum verŝajne tamen en la plimulto de kazoj la tuta sumo ne estas tuj bezonata.

Mi rekomendas jenajn kapitalplimultigojn:

1. La klasika ŝparlibro, kvankam per ĝi oni momente gajnas nur 2-3% da interezo. Tamen, ĝi estas pli taŭga ol lasi la monon en la ĝirkonto. Komprenible oni devas atenti, ke preni monon sen perdo de interezo eblas nur en certa alteco, t.e. nur ĝis maksimuma sumo.
2. Kiam asocio povas antaŭvidi malproksiman daton, kiam ĝi bezonos la monon, ekzemple post duona jaro, tiam mi rekomendas kontrakti t.n. ŝparleteron kun firma interezo. La bankoj koncedas firmajn procentojn por la ŝpardaŭro, en Germanio ekzemple inter 3,25% kaj 4,5%. En kelkaj aliaj landoj bankoj kompleksas per pli altaj interezoj. Kiam la ŝparanto

deziras rehavi la monon post la investa periodo, li devas denonci la kontrakton ĝustatempe tri monatojn antaŭ la fino de la kontrakto. Kiam oni deziras repagon antaŭ la fino, la banko debetas parton de la interezo pro la perdo de la investprofito.

3. Per sufiĉe granda sumo, eble 3000 ĝis 10 000 DM, la asocio povas aĉeti akciojn de entreprenoj, kiuj antaŭkalkuleble liveros grandsuman gajnon, kiam oni vendos la akciojn. Ekzemple per akcioj de TELECOM, ĉu en Francio ĉu en Germanio, oni plimultigis la kapitalon ĝis trioblo aŭ pli ol trioblo de la aĉetprezo.

Antaŭ ol riski per plimultigo de la kapitalo per akcioj, la asocio devas atente studi seriozajn informojn pri la financa situacio de la entrepreno.

Mi fine konkludas, ke la laborista Esperanto-movado iam en proksima tempo fiaskos, se ĝi ne povos interesi la junularon per modernaj metodoj – kiuj kostas monon!

A. Stephan



desegnaĵo de Renate Alf

Ni mobilizu la subjektivajn faktorojn

Inter hobia kaj socia engaĝiĝo

de I. F. Bociort

Mi ricevis interesan leteron de juna, serioza kaj bone informita esperantisto. Li konstatas, ke la movado «trapasas iun paradigmoŝanĝon ĝuste nun, demetante sian 'movadan' eksterajn kiel serpento sian malnovan haŭton, kaj fariĝante definitive iom hobia «komunumo» de samlingvanoj, kiuj volas aperi ĝuste kiel tia, kaj ne kiel batalantoj de nova ideo, antaŭ la okuloj de la ekstera publiko». Kredeble, li pravas.¹

Estas kompreneble, ke iuj jam delonge hobiumis en Esperanto. Oni hobiumas de poŝtmarkoj kaj kolektado de horloĝoj ĝis lingvistiko, astronomio ktp. Temas pri ĉies rajto, ĉar hobia havas ankaŭ spiritaajn funkciojn. Mia demando estas, *kial* la movado ĝenerale fariĝas «definitive» hobia? Ĉu estas «pracelismo» malŝatinda atentigi, ke Zamenhof, Privat, Hodler, Lanti, Lapenna, Kalocsay, Baghy, Regulo Pérez, Andreo Ĉe kaj la ceteraj niaj «idealistoj» konceptis multe pli altan funkcion por Esperanto ol nova hobia en la socio? Do, se la nunaj esperantistoj hobiumas, tio estas *sekvo* de la «komfortemo», kiu aperas en kredo sen apostoloj, en armeo sen gvidantoj, en komunumo displektita en malpacajn grupojn gvidatajn de orgojloj kaj nekunlaboremo. Oni devas renversi tiun situacion! Ni revenu ne al «finvenkismo», sed al ceteraj funkcioj de la internacia lingvo! Vere rimarkis altestiminda prof. Selten (EPC n-ro 1/2000), ke li venis al Esperanto pro ties *idealo*. Tiun aserton povus

fari ĉiu el niaj personecoj. Pri la idealo «hodiaŭ oni malmulte parolas», rimarkis Selten, kaj miaopinio tio iras paralele kun la nenionfaremo *en alta senco*, kun la hobia-igo de la movado. La sciencistoj, ege okupitaj kun esploroj, ideoj kaj pensoj, neniam alvenintus al Esperanto por praktiki platanon hobia. Niaj «realistoj» ne kapablas aŭdi, ke *la ideoj kantas aŭ ploras petante helpon*, dume la «idealistoj» oferas tempon, intelektan energion, korvarmecon, monon, eble eĉ sanon, por alproksimiĝo de la diversnacionoj en mondo dividita, malamika ĝis absurdeco. Noblaj ideoj bezonas nek aĉeti la homojn, nek promesi al ili ŝatokupon dum la lastaj vivojaroj. Ĝuste en manko de engaĝiĝo por *ideo*, post la forpaso de multaj, elstaraj «idealistoj», longekaj klarvidantaj, kuŝas la PRETEKSTO de nefavoraj «objektivaj kondiĉoj» – *pri kiuj certe oni atente diskutu, sed nur se la «subjektivaj kondiĉoj» funkcias samtiel vigle, kuraĝe, racie, multflanke kiel antaŭe!* Ĉu pro la «objektivaj kondiĉoj» dispeciĝis kelkaj iam koheraj landaj asocioj? Antaŭ ol babili pri eksteraj kondiĉoj, pri «monda krizo», oni vidu kaj likvidu la mensan krizon de pluraj konfuzitaj samideanoj. *Nin malhelpas krizo de gvidado, de engaĝitaj personecoj.* Prefere ni trovu junajn personecojn, kiuj volas kaj povas doni al nia movado pli da digno, da prestiĝo. La historio de la 60-aj, 70-aj jaroj montras, ke ni povas alfronti diverstipajn provokojn. La nuna «krizo» de la Esperantomovado ne estas la unua. Ni esperu, ke ankaŭ nuntempe troviĝos karakteroj...

¹ D-ro Bociort permesis menciigi ĉi tie, ke temas pri mi, Gary M. (GM)

Jes, la maldekstruloj...

«Ĝuste maldekstruloj devus plenumi tiun taskon, se ĝi entute estas plenumbla», skribas mia korespondamiko. Ĝenerale dirite, por ĉiu serioza socia ŝarĝo necesas homoj kapablaj unuigi en siaj animoj la racion kun la pasio. Nia movado havis tiajn grandajn homojn, de Zamenhof ĝis hodiaŭ. Mi povus citi, el mia ne tro granda rondo de konatuloj, almenaŭ 40-50 personojn, kiuj kapablas multe kaj grave efiki por Esperanto. *Mankas nur la forto destinita al mobilizado de la kapabloj.* Tiu forto povus esti hodiaŭ malgranda celkonscia grupo, egale ĉu la anoj estus maldekstruloj aŭ ne. Tamen, miaopinio ofte oni venas al konkludo, ke pli da sindonemo, da agado sen tuja profito, sen aspiro al registaraj funkcioj (tion faras la ordinaraj politikistoj), troviĝas inter la maldekstruloj. Ankaŭ ili analizas la «objektivajn kondiĉojn», ĉar, sen konsideri ilin, ĉiu agado povas fariĝi utopia. Sed «utopio» ne estas koncepto unusenca kaj objektiveme mezurebla. Ĝi havas ankaŭ subjektivajn komponantojn, tial por la malkuraĝaj karakteroj, nekapablaj pensi ideojn ĝis ties fino, «ĉio» estas utopio, ĉio «ne eblas», nenio do meritas firman engaĝiĝon krom tuj propra intereso. Honesta homo nuntempa tre bone scias, ke sennombraj atingajoj de la civilizo estis iam «utopioj», kiuj fariĝis realo per firma agado de «utopiistoj». En lernejoj la instruistoj laŭdas antaŭ la junularo la iamajn kuraĝajn personecojn (sciencistojn, revoluciulojn ktp.), kiuj ne timis, eĉ kapablis kontraŭi danĝerajn personojn aŭ instancojn (religiajn, politikajn), sed la kleraj nuntempaj instruistoj ĉiugradaj ne *demandiĝas kion ili mem faras kun la validaj ideoj de nia tempo!* Iliaj laŭdoj spegulas nur propran hipokritecon.

En nia movado oni babilas pri «finvenkismo», «pracelismo», «lapennismo», «desubismo», «desuprismo», «raŭmismo» ktp. kaj oni kredas, ke *per tia kabineta teoriumado oni faris siajn devon kaj eblon por la movado.* Nu, teorio havas sencon nur kiel eksperimento sur abstrakta modelo por plibonigi la ŝancojn de la praktika agado. Mi havas nenion kontraŭ la subtila analizo de la situacio en la movado – ĉu ĝi estas komunumo, civito, aŭ simple «movado», sed resti al tiu surpapera analizo oni ne plenumas la esencajn funkciojn de la teoria analizo. Mi legis eĉ subtilajn difinojn de nuntempaj sociaj konceptoj, kaj ili memorigis min pri la sennombraj kaj konfuzaj difinoj, kiujn la sociologoj de la tradiciaj skoloj donis al la homa socio. Ili nur tion povis fari. Male, fama maldekstrega barbulo neniam difinis la kapitalisman socion, sed analizis ties strukturojn kaj funkciojn en senprecedenca maniero, kaj faris tion kun konkreta celo: ŝanĝi la situacion. En sia 12-a *Tezo pri Feuerbach* li faris grandsignifan aserton: «La ĝisnunaj filozofoj diversmaniere interpretadis la mondon; temas nun pri ties ŝanĝo».

La maldekstruloj vidas la malĝustajojn kaj la necesajn fendaĵojn ne tial, ĉar ili estus pli saĝaj ol la aliaj homoj, sed nur tial, ĉar ili havas nenian intereson kaŝi la veraĵojn kaj havas la necesan karakteron por esti konsekvencaj al siaj kredoj.

Bv. legi atente la verkojn de la iamaj utopiistoj: Campanella, Tomas Morus k.a. kaj vi vidos ke iliaj tezoj havas pli malpli demokratian karakteron kaj kelkaj iliaj ideoj jam efektiviĝis. Ĉu eble ili estis «maldekstruloj»? Ili estis nur raciistoj kaj ne kredis, kiel Leibniz, ke la nuna mondo estas la plej eble bona.

Ĉu etnofiliokritika sennaciismo?

de Gary Mickle

Boletis dum la pasintaj monatoj debato en *Sennaciulo* kaj nun *Laŭte* pri kelkaj malnovaj, sed neniam forgesitaj temoj: SAT, sennaciismo kaj la koncepto de Lanti pri sennaciismo vortigita en lia *Manifesto de la Sennaciistoj*. Ne necesas resumi la enhavon ĉi tie. Interesitoj trovas kontribuadojn de Jurgen Kuhl, Gilbert Ledon kaj la aŭtoro de ĉi tiu artikolo en la du gazetoj.

Pro kelkaj kialoj la sennaciismo de longe estas traktata de multaj en la praktiko kvazaŭ ne la plej disfamiĝinda facto de SAT kaj ĝia idehistorio. Ofte la «traktado» de ĝi konsistas nur el insistaj klarigoj, ke la sennaciismo neniel estas la baza koncepto de la tuta SAT.

- La koncepto ne trovas multe da aprezo en rondoj ekster SAT, rilate al kiuj tiu ofte sentas sin en defensivo.
- La pure lingva faktoro, ke «sennaci-» estas SAT-tipa lingvero kaj neofta aliloke, faras la distingon inter «sennacieca» (kia SAT pretendas esti) kaj «sennaciisma» (kia nur unu funkcianta frakcio pretendas esti) perfekte obskura por neinicitoj.
- La koncepto de sennaciismo ne estas sufiĉe komprenata de SAT-anoj mem, kiuj devus klarigi al aliaj, kio ĝi estas kaj kiel SAT kiel tuto rilatigas sin al ĝi.
- Lanti estis tre ravita de sia ideo. Eble li volis superatuti la tiam fortegan stalinisman frakcion en SAT je radikalismo kaj verŝajne lin influis la epoktipa politika hiperbolo de la tridekaj jaroj. Ĉiukaze li entuziasme formulis kaj ne ŝparis je afersimpligaj, sentencaj eldiroj.

La hodiaŭan leganton povas iriti la terminologio de Lanti, kiu aplikas ĉie la klasikan «nacio»-nacion, kiu ampleksas kaj la nocion «etno» (novtempa vorto en Esperanto kaj nenie aperanta en la *Manifesto*) kaj la nocion «ŝtato». Pli ol la mankantaj terminoj «etno» kaj «etna kulturo» ĝenas la mankanta diskuto pri la eventuale grava rolo de etnaj kulturoj kiel unu formo de kultura diverseco – kiun Lanti favoras, alie ol antaŭjuĝuloj eble supozas. Ankaŭ devas iriti tiujn, kiuj skeptikas pri la verda venko, ke la esperantista «praelismo» rolas en la lantia sennaciismo kiel ne forpensebla konsistero.

Kio laŭ mi pli ol kompensas la kritikindajn trajtojn de la lantia sennaciismo, estas ĝia senpardonpete *kosmopolitisma* kvalito, la optimisma supozo, ke individuo povas konscie stariĝi ekster naciaj kategorioj, la kompreno, ke necesas politika *movado*, kiu kontraŭbatalu la naciismon per radikala alternativo, kaj la preteco eldiri la evidentajn, kiun naciistoj kaj etnistoj ne volas integri en sian penson: ke la teknologio plektis tutteran komunikan reton kaj kreis kondiĉojn, en kiuj la mondo nepre poiome senetniĝos – eĉ se tio okazos malrapide.

Se ni volas teni la aferon de sennaciismo viva, ni traktos ĝin per la kritika sendogmeco, kiun Lanti rekomendis. Tiam neniu havos problemon akcepti en ĝi ideojn, kiuj devias de la lantiaj. Ĉiismo, se ĝi entute ekvivas en pli ol unu kapo, ĝlitas el la manoj de ĝia konceptinto. Rigardu la etnismon. Malmultaj konscias, kiom la etnismo de esperantistoj kaj IKEL diferencas de la originala

etnismo konceptita de François Fontan. (Vidu la postan artikolon.)

Mi persone vidas la taskon de moderna sennaciismo pli en la akcelado de kritika debato pri etnofilio kaj etna identismo ol en la popularigo de pozitiva utopio de sennacieca mondmastrumado, kiel Lanti entreprenis fari. Kio estas «etnofilio» kaj «etna identismo»?

Etnofilio mi nomas la inklinon okupiĝi pri etnoj kaj etnaj kulturoj kaj la ŝaton de etnaj kulturaj diferencoj. Jen afero, kiu disvastiĝis dum la pasintaj jaroj, ankaŭ kiel elemento de la *multkulturismo*. En la simpla formo ĝi estas absolute ne kritikinda aŭ malbona. Problema, aliflanke, estas tia *etnofilia politiko*, kiu celas asigni specifan etnan karakteron al ĉiu, eĉ etne miksitaj teritorio, kaj kiu envivigas leĝajn stipulojn favorajn al etna purigado en la lingvo (forigo de fremdlingvaĵoj), limigita uzado de fremdaj lingvoj en la publika vivo, leĝdeviga favorado de indiĝenaj muzikaĵoj kaj aliaj kulturproduktoj en radio kaj televido, ktp.

Etna identismo mi nomas la promociadon de forta etna identeco ĉe individuoj kaj komunumoj. Jen afero danĝera ekde la komenco, ĉar en nia nuntempa mondo ligita kun ĉiaj moralaj kaj eĉ leĝaj premoj kontraŭ individuoj. Tipe ligitaj kun la etna identismo estas ideoj de etna singulareco (laŭ kiu homo ne povas aparteni al du aŭ pli da etnoj samtempe), kontraŭasimilismo (laŭ kiu asimiliĝo en «fremda» etna ĉirkaŭaĵo estas danĝera afero por la koncerna homo, kiu per ĝi fariĝas «malaŭtentika»), dependeco de la etna identeco de la primara ensociigo (ekskluziveco de la familio kiel peranto de etneco) kaj primareco (laŭ kiu la etna identeco estas la kerna elemento de la individua identeco).

Etnofiliaj kaj identismaj ideoj rolas kiel nediritaj premisoj, kvazaŭ memkompreneblaĵoj, je multaj okazoj. Kelkaj tiaj estas:

- la ŝtata registrado de la etneco (nacieco) de enloĝantoj: Kiam oni faris lingvan censon en Suda Tirolo antaŭ jaroj, la Verdula partigvidanto Alexander Langer rifuzis sin deklari ano de unu el la lingvaj grupoj, tute laŭvere, ĉar li praktike apartenis kaj al la itala kaj al la germana lingva grupo, kiel multe da aliaj homoj en Suda Tirolo. Pro tiu bone motivita rifuzo simbole kliniĝi antaŭ la dogmo de etna singulareco li estis ekskludita kiel urbestrokandidato en Bolzano (Bozen).¹ La eksa Jugoslavio, kontraste, allasis dum jaroj registriĝon de homoj de miksa etna deveno kiel «jugoslavo». Notinde malkreskis la preteco fare de la instancoj registri infanojn sub tiu (ne strikte etna) kategorio dum la 70aj kaj 80aj jaroj, la tempo, dum kiu kreskis kaj la kulto de etna identeco kaj la interetna malfido.
- kiam oni persone diskriminas homojn, eĉ se nur per misprezento kiel kompatinduloj aŭ neaŭtentikuloj, kies konduto ne kongruas kun la supozata etneco aŭ kun imagitaj etnanaj devoj: En libro, kiun IKEL eldonis², la aŭtoro eldiras pri forlasintoj de minoritata lingvo jenon: «Pro tiu perdo [de pli

¹ Indas rimarki, ke la gazeto *Etnismo* (IKEL) siatempe tre kompreneme komentis la sintenon de la kontraŭuloj de la etna popolnombro, konstatante la neadekvatecon de la kategorioj, kiuj ne inkluzivas neetnajn identecoformojn, kaj kritikante la «desupran premadon en mensogajn kadrojn»: U. J. Moritz en *Etnismo* 50 de 1992-01-31, p. 26
² Marcel Cortiade: *Pri difino de etna identeco*, IKEL, Eschweiler, 1989 (p. 9)

frua etna lingvo (GM)], oni konstatas, krom t.n. 'metropola malespero', soifon al iu ajn identeco aŭ identigilo: homgrupiĝojn laŭ plej strangaj kriterioj, kiel ekz. manĝmaniero, etreligioj kaj sektoj, seksaberacioj, ŝatokupo kaj hobio ktp...» Kvazaŭ tiuj transetniĝantoj ne posedus la saĝon trovi la grupajn identecojn, kiuj vere konvenas al ili, kaj bezonus etniston, kiu preskribas al ili la ĝustan! Mi mem, devena de Usono kaj intertempe sufiĉe asimiliĝinta en Germanio, aŭdis jam eldirojn, ke mi malplenumas kvazaŭan moralan devon, ne konservante ĉe mi atributojn de usoneco.

- kiam malnovmodaj naciistoj atakas kosmopolitojn kiel denaturitojn: Mi legis antaŭnelonge, ke «...edukado sen patriota amo de la propra nacio senigas la personecon de infano je la ebleco evolui ĝis ties plena homeco. Tial dubindigo sub iu ajn preteksto de la ekzisto de la nacio, kiu konformas kun la leĝo de la naturo, estas klarega kosmopolita denaturigo.»³ Do nur la naciisto estas «plena homo». Diabligo de «kosmopolitoj» kaj «kosmopolitismo» havas tradicion ne nur ĉe tradiciaj dekstraj naciistoj, sed ankaŭ praktikiĝis sub Stalin.
- kiam ekstremdekstruloj prezentas enmigradon kiel minacon al la indiĝena kulturo de tuta lando,
- kiam etnistoj dubindigas la rajton je migrado: «Ofte oni prezentas migradon kiel rajton. Ni opinias ke pli grava estas la rajto je plena disvolviĝo de la homo en sia hejmlando. [...] Ju pli homdensa la mondo, des pli limiga

³ W. Moszkowski: «Kosmopolityzm wynaturzony» [Denaturita kosmopolitismo] en la pola ekstremdekstra-klerikalisma tagjurnalo *Nasz Dziennik*, 2000-04-15/16, p. 19 (trad. de GM)

bedaŭre devas esti la kontrolo de amasmigroj.»⁴

- kiam esperantistoj kritikas la lingvan imperiismon de la angla tiel, kvazaŭ ĝi korodus neanglalingvajn etnajn kulturojn (kaj kvazaŭ Esperanto, se tutmonde adoptita, ne farus la samon),
- okaze de naciliberigaj bataloj, kiam la nacia aspekto iom post iom eklipsas la socian, ktp.

Kiom ajn la okazoj malsimilas kaj kiom ajn dise situas la agantoj sur la skalo de dekstreco-maldekstreco, tiom similas la fona ideologio kaj tiom kreskas la ŝancoj de la «nova dekstrularo» fiŝkapti inter la aktivistoj de ĉiuj etnofiliaj aferoj.

Unu tasko de etnofiliokritika sennaciismo fronte al tiaj aperaĵoj estus elstarigi la libervolecon de identecoj. Eble utilis propagandi la homologecon de konfesi-eco kaj etneco, kiom temas pri la socia aŭ ŝtata teniĝo al ambaŭ. La etneco, etna identeco de homoj, same kiel ilia religia aparteno, kontraŭreligi-eco aŭ religia indiferenteco, estu ilia privata afero, pri kiu la ŝtato kiel eble plej malintense okupiĝu.

Ĉu troviĝos homoj, kiuj rafinos la originan lantian idearon de «sennaciismo», farante el ĝi pli bonan kontraŭnaciisman batalilon? Mi ne scias. Se jes, tamen, jen kredeble originala esperantista kontribuo al la tutmonda klasbatalo.

En la reto:

Vortoj de Kamarado E. Lanti:
www.multimania.com/satesperanto/lanti/menuo.htm

Sennaciismo, kosmopolitismo, kritiko de etnofilia politiko: <http://home.germany.net/101/121591/skk/index.html>

⁴ Marcel Cortiade: *Pri difino...* (p. 30)

Kiel mi serĉis mian identecon ĉe la etnistoj de la Fontan-skolo

de Gary Mickle

Unu virtuala ejo, kiun mi forlasis pli sennaciisto, ol kiam mi eniris ĝin, estas, paradokse, la etnisma TTT-ejo www.ethnisme.com. Mi varme rekomendas ĝin al ĉiu, kiu komprenas la francan (aŭ la anglan – la ĉefverko de Fontan enestas ankaŭ en angla traduko). Mi esperas, ke ĝi tradukos sian oferton en kelkajn pliajn lingvojn, ĉar ĝi estas instruiva specimeno de la identecmanio kaj etnofilio portitaj ĝis ridindaj ekstremoj. La TTT-ejo estas prizorgata de Ben Vautier, adepto de François Fontan, kaj ĝi enhavas verkojn de ambaŭ.

Jen nekutima afero: esperantista agado idee superflugas sian neesperantistan ekvivalentaĵon, la efektivan originalaĵon. La etnismo, kiel ĝin kutime komprenas esperantistoj, en unuopaj kazoj meritas kritikon, sed espereble neniu volus kritikaĉi unu bazan celon de la esperantista etnismo kaj IKEL, nome la defendon de vere diskriminataj minoritataj etnoj. Ankaŭ ne kulturkonservan laboron favore al etnaj kulturoj, kiom ĝi ne estas kuplita al la reacia kulto de etneco.

De François Fontan, laŭ la informoj de www.ethnisme.com, originas la termino «etnismo». Li aŭtoris en 1961 la verkon *Ethnisme, vers un nationalisme humaniste* [Etnismo, aliro al humanisma naciismo], legeblan en la TTT-ejo. Li ŝajne poste ludis ne malgravan rolon ĉe la vivigo de la samnoma movado en Francio.

Fontan kaj Vautier proponas, surbaze de tiucele starigitaj principoj, establi unuetajn ŝtatojn en multaj lokoj de la mondo, kie nun estas multetnaj. La etnan apartenon de iu teritorio ĝenerale –

kiom la grava konsidero de justa teritoria disdivido ne kontraŭas – determinu historiaj faktoroj, ofte tre praaj. Ĝis certa grado ili akceptas, ke homoj loĝu kiel eksterlandanoj ekster sia etna teritorio.

Mi scivolis, ĉu Fontan kaj Vautier povas diri, kia estas mia propra «vera» identeco – spertinte, ke identecmaniuloj ofte kapablas difini la etnan identecon de homoj pli bone ol la koncernitoj mem. (Necesas klarigi ĉi-loke, ke mi naskiĝis kaj kreskis en Usono, venis 19-jara al Germanio, vivis ankaŭ unu jaron en Nederlando, krom tio ĝisvivis mian nunan 48an vivjaron en Germanio, kaj se mi devus difini mian «etnan identecon», mi nomus ĝin kompleksa: pli germana ol usona, sed ankoraŭ pli kosmopolita ol tiuj ambaŭ.) Kun intereso mi eksciis ĉe www.ethnisme.com, ke individuoj povas transetniĝi, t.e. asimiliĝi, en loĝlando alia ol la devenlando. Restas la demando, ĉu tio okazis ĉe mi. Sed nun komenciĝis la problemoj. Unue, al la usona etno mi ne povas aparteni, ĉar tia ne ekzistas. En Usono loĝas multaj diversaj, laŭ la familia deveno difineblaj etnoj, tute intermikse, kio laŭ la fontanistoj estas ne en ordo kaj ŝanĝenda per la kreo de apartaj unuetajn ŝtatojn en Norda Ameriko. Ekzemple, la regiono en norda Kalifornio, kie mi pasigis mian infanecon, devus laŭ ĉi tiu koncepto iĝi ĉina teritorio. La eŭropdevenaj loĝantoj de Usono estas laŭ la kompreno de Fontan ĝenerale angloj. Sed miaj prauloj devenas el ok eŭropaj landoj, inter kiuj el Anglio nur malmultaj. El Norvegio venis preskaŭ duono.

Restas la ebleco, ke mi dum la longa vivado en Berlino sufiĉe transetniĝis por esti kalkulata al la loka etno. Certa estas, kontraŭe al ĉies ĝisnuna supozo, ke germanoj ne estas la ĉefa etno loĝanta en Berlino. Laŭ la al mi konataj variantoj de etnismo la etnecon determinas unuavice la lingvo. Ankaŭ en ĉi tiu kazo – sed gravas historiaj lingvaj faktoj. La studado de dialektologio kaj dialektogeografio de antaŭaj jarcentoj ne ebligis al Fontan diri definitive, ĉu la loĝantoj de la norda Germanio estas platdiĉoj aŭ nederlandanoj. Ĉiukaze ili ne estas germanoj.

La teorifondintoj allasas ankoraŭ la eblecon, ke la unu geedzo en miksetna geedza paro transprenas la etnecon de la alia geedzo. Eblus do argumenti, ke havante polan edzinon mi mem fariĝis polo – eleganta solvo fronte al la fakto, ke mia etna aparteno ne estas laŭ aliaj principoj determinebla kun certeco.

Resume, mi havas neniun kialon por supozigi min usonano aŭ germano (por nenion diri pri sennaciulo), sed eble anglo, norvego, platdiĉo, nederlandano aŭ polo.



La kunveno de UK-kongresanoj kaj reprezentantoj de maldekstraj organizaĵoj, kiun la Maldekstra Forumo aranĝis dum la pasintjara berlina UK en pensiona ĝardeno (vidu *Magazinon* 27, p. 23)

Necesas aldoni, ke la demando pri la individua etna aparteno en la etnisma «utopio» de la fontanistoj, ne estas pure akademia demando. Kaj ne nur morala imperativo bazita sur la ideo, ke ĉiu homo kultu siajn «radikojn». Ne, en la antaŭvidata monda ordo la individua etneco devas kongrui kun la etna karaktero de la loĝlando, por ke la individuo ĝuu la rajton je partopreno en la politika vivo.

Kia koŝmara mondo, en kiu oni klasus ĉiujn homojn kaj ĉiujn teritoriojn laŭetne. La sudafrika apartejo estis simila, kvankam ĝi miksis etnajn kaj rasajn kriteriojn. Iusence, la klasado laŭ rasaj kriterioj eĉ estis pli «homafabla», ĉar pli simpla kaj antaŭvidebla. En dubaj kazoj, komisiono de oficistoj rigardis la aspekton de homo kaj decidis pri ties aparteno. Aliflanke, la fontanismo antaŭvidas laŭeble egalecan dispartigon de la tera spaco inter etnoj – principo, kontraŭ kiu la apartejo krude atencis. Sed ĉu tio realigeblas sen tut-teritoriaj etnaj purigoj?

Broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino: *Esperantistische Weltbilder* de Wojciech Usakiewicz (2a parto)

Jen eltiraĵo el la unua broŝuro de la serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem*. Temas ĉi tie pri la dua el ĝiaj tri partoj, kiu pritraktas la sennaciismon de Lanti. La trian parton ni prezentos en la venonta numero de la *Magazino*.

- En la pli temspecifa serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem* aperis ĝis nun ĉi tiu kaj du pliaj broŝuroj: *Lazarus Ludwig Zamenhof* de Gaston Waringhien (kun *Brief über die Entstehung des Esperanto* de Zamenhof) kaj *Esperanto und Anarchismus* de Will Firth. La broŝuroj de ĉi tiu serio kostas po DM 1,20.
- En la pli ĝeneralinforma *info-serio* aperis ĝis nun *Was ist Esperanto? Wozu Esperanto?* kaj *Eine andere Kommunikationsidee: Esperanto*. Ili kostas po DM 0,80.

La teksto de la broŝuro estas eltiraĵo el Usakiewicz, Wojciech: *Esperancja – Kultura i kulturotwórcze mechanizmy*, Instytut Kultury, Warszawa 1989, S. 71-101; tradukita de Gary Mickle. La teksto estis eldonita kun la afabla permeso de la aŭtoro.

Der Anationalismus von E. Lanti

„Mein Ziel ist der Weltstaat, und mein Anationalismus ist ohne Esperanto nicht vorstellbar.“¹¹ So ist der Ausgangspunkt der Konzeption des wohl originellsten esperantistischen Denkers, Eugène Lanti.¹² Lanti, Gründer der Arbeiter-Esperantisten-Organisation SAT und 1922 bis 1933 ihr Vorsitzender, erklärt: „...der Anationalismus ist keine völlig neue Idee, er ist nur ein neuer Terminus. Das Wort 'Kosmopolitismus' hat fast dieselbe Bedeutung.“¹³ Mit Themen gesellschaftspolitischer Art verbindet Lanti die internationale Sprache, die in seiner Konzeption eine



Eugène Lanti (Eugène Adam) 1879-1947

grundsätzliche Rolle spielt. „Offen gesagt, habe ich persönlich nie darauf geachtet, ob der Anationalismus mit den Aussagen bekannter und maßgebender Theoretiker übereinstimmt oder nicht. Als ich feststellte, daß mein Standpunkt irgendwie ketzerisch ist, hat mich das nicht gewundert. Marx, Lenin, Kropotkin und andere waren keine Esperantisten. Sie zogen das Sprachenproblem nicht in Erwägung. Ich aber bin Benutzer der Weltsprache, Esperantist und infolgedessen kann ich bei der Betrachtung gesellschaftspolitischer Fragen einen Faktor nicht vernachlässigen, den ich für wichtig halte. Ich habe die Esperanto-Bewegung nie als etwas Nebensächliches (*akcesora*) und der Beachtung der Arbeiterführer Unwürdiges eingeschätzt.“¹⁴

Bei der Analyse des historischen Prozesses sieht Lanti zwei Arten von Auseinandersetzungen: klassenmäßige und nationale. Die erste von diesen hält er für schöpferisch, die zweite für rückschrittlich. „...der Anationalismus erkennt den Klassenkampf als Tatsache

und als fortschrittlichen Faktor des historischen Prozesses an. Den Proletariern rufen wir zu: 'Beteiligt euch niemals, nirgendwo und aus keinerlei Grund zustimmend an einem nationalen Kampf; nur der Klassenkampf ist für unsere Klasse befreiend und vorteilhaft'.¹⁵ Der Klassenkampf hat für Lanti allerdings vor allen Dingen eine moralische Dimension. Er bedeutet nicht unbedingt den Gebrauch von Gewalt. „Wenn von Klassenkämpfen die Rede ist, erscheint vor unseren Augen ein tatsächlicher bewaffneter Straßenkampf zwischen dem aufständischen Proletariat und Verteidiger der Bourgeoisie. Aber meistens findet der Klassenkampf auf einer scheinbar friedlichen Art statt. Ein friedlich aussehender Streik ist allerdings ein tatsächlicher Kampf zweier Klassen: der Lohnarbeiter auf der einen Seite und der Arbeitgeber auf der anderen. (...) Anationalisten können die Existenz von Klassen nicht ignorieren, und ich schließe mich gern der Auffassung von Marx an, daß der Klassenkampf einer der Faktoren des gesellschaftlichen Fortschritts ist.“¹⁶ Lanti billigt den Gebrauch von Gewalt in extremen Situationen, unterstützt allerdings keine autoritären Systeme, nicht einmal bei der Verwirklichung elementarer Grundsätze, das heißt, bei der Auflösung der Nationen. „Ich bekunde ohne zu zögern, daß die Perspektive einer Welt-diktatur die Billigung von Anationalisten nicht finden soll. Große Kasernen und Gefängnisse wirken auf mich nicht anziehender als kleine. Obwohl der Anationalismus darauf abzielt, einen Zustand zu erreichen, in dem die Menschlichkeit die nationale Zugehörigkeit (*nacieco*) des Individuums erstickt, so darf man nicht vergessen, daß Menschlichkeit mit Verlust der Freiheit nicht einhergehen kann. Anationalisten dürfen also überhaupt nichts unterstützen, was den Erhalt bzw. die Festigung der nationalen Zugehörigkeit sichert, aber auch nichts, was die Menschenwürde niederhält. Sie sollen nur mit allen Mitteln nach einer freiwilligen nationslosen Selbstorganisation auf allen Gebieten streben.“¹⁷

Lanti bezieht sich negativ zu nationalen und ethnischen Problemen. Er weist auf die Kon-

ventionalität des Nationsbegriffs hin und behauptet, daß die Lösung nationaler Probleme auf der Welt die Klassenauseinandersetzungen nicht beseitigt, die dagegen nur auf Weltebene beseitigt werden können. Von diesen Voraussetzungen ausgehend, polemisiert er gegen die Internationalisten ebenfalls, wobei er die Vorstellung der Selbstbestimmung der Völker als vorübergehende halbe Maßnahme behandelt. Die Beseitigung der nationalen Besonderheiten soll aber nicht zur Vereinheitlichung der Welt führen. Gerade im Gegenteil: „Wenn man Menschen nicht mehr national und stattdessen zu Persönlichkeiten erziehen würde, wenn die Menschen sich selbständiges Denken angewöhnten und ein relativistisches Verständnis von der Bedeutung und vom Wert der Ideologien und Systeme erlangten, dann wären alle sich selbst gegenüber tolerant, und es wäre nicht zu fürchten, daß alle sich gleich anziehen, Möbel im gleichen Stil besitzen, oder genau dieselbe Musik hören würden. Bei jedem das Gefühl des Autonomseins zu verstärken kann nur zu einer Differenzierung der Gedanken, Geschmacksausprägungen und Lebensweisen führen. Der Anationalismus würde also nicht zu Einförmigkeit, sondern ganz im Gegenteil zu ungehemmter Originalität hinführen.“¹⁸

Ein Grundmechanismus des historischen Prozesses ist das allen Menschen gemeinsame Gerechtigkeitsgefühl. „In einigen Sprachen werden die Begriffe 'gerecht' und 'richtig' durch dasselbe Wort ausgedrückt. Das ist leicht erklärlich: schlecht angepaßte Gegenstände lassen uns an etwas Unordentliches und in der Konsequenz Schlechtes denken. Genauso wie Menschen mit eigenen Augen beobachten können, daß die eine Sache richtig ist und die andere unrichtig, genauso können sie die Gerechtigkeit verstehen. Wenn aber die Menschen von selbst danach trachten würden, gerecht zu handeln, wäre die Welt harmonisch (*honorda*) und friedlich. Der Verzicht auf Gerechtigkeit ist Ermutigung der Ungerechten.“¹⁹ Der in dieser Aussage enthaltene Rationalismus ist charakteristisch bei Lanti. Ähnlich wie Zamenhof, schreibt er der wissenschaftlichen Erkenntnis

einen hohen Rang zu, wobei „wissenschaftlich“ gleichbedeutend ist mit „rational“. „Die Wissenschaft ist ohne Einschränkung anational, auch wenn Wissenschaftler Nationalisten sein können. Eine wissenschaftliche Entdeckung ergibt sich immer aus rationalem Denken und Beobachten.“²⁰ Eine ähnlich wichtige Rolle schreibt Lanti der Kunst zu, die sich auf das Gefühlsleben bezieht: „Die Kunst bezieht sich meistens auf das Gefühl und deshalb kann sie von rein nationalem Charakter sein. Ein anational denkender und fühlender Mensch ist derjenige, in dessen Geist Vernunft und Gefühl sich in harmonischem Gleichgewicht befinden.“²¹

Mit dem Rationalismus verbindet sich Antidogmatismus: „Wir Anationalisten gehören zur proletarischen Klasse, also ist es ganz natürlich, daß wir deren Emanzipation ersehnen; wir neigen der Auffassung zu, daß das Proletariat eine 'historische Mission' zu erfüllen habe, und zwar die Schaffung einer Gesellschaft ohne Klassen und Grenzen. Wir sind uns aber bewußt, daß das nur ein frommer Wunsch ist. Wir können keine Gewißheit haben, daß es unwiderruflich so geschehen wird. Auf den Ruinen der kapitalistischen Gesellschaft sehen wir schon in einigen Ländern Faschismen verschiedener Farbe entstehen, etwas, was Marx nicht vorhergesehen hat. Genauso wissen wir aber, daß die gerechte Gesellschaft ohne Klassen und Grenzen, die wir fordern und anstreben, nicht etwa durch ein Wunder entstehen wird. Sie kann nur aus unserer Tätigkeit, aus unserem Kampf, aus unseren Fähigkeiten hervorgehen. Deshalb müssen wir unseren Intellekt vor jedem Dogmatismus wahren, um aus unseren Erfahrungen und sogar aus unseren Mißerfolgen Nutzen zu ziehen.“²²

Lanti berechnet nicht die Jahre bis zur Verwirklichung seiner Ideen. Er versucht nicht einmal, den Zeitrahmen der Verwirklichung zu bestimmen. Als Weg zur Realisierung des Anationalismus empfiehlt er Selbstbildung und Kultivierung des Esperanto. Seiner Meinung zufolge sollte die anationalistische Bewegung bis zu einer Zeit, in der günstige Bedingungen ent-

stehen, elitärer Natur sein. Wichtig in dieser Konzeption ist die Rolle des Esperanto und Lantis Verhältnis zu Zamenhof. „Anationalismus unter Nichtesperantisten zu propagieren, wäre etwas Ähnliches wie Unterricht über Belletristik für Analphabeten.“²³ Lanti hält die Kenntnis des Esperanto für eine notwendige Bedingung, die jemand zum Anationalisten qualifiziert. Seine Einschätzung der Rolle des Esperanto in der gegenwärtigen Welt ist eine skeptische: „Esperanto hat doch keine ausreichende Verbreitung gefunden, um in der Praxis erfolgreich gegen die großen Nationalsprachen zu konkurrieren. Das Gegenteil zu behaupten ist Selbstbetrug oder zielt darauf, Andere zu betrügen. Es wäre doch leicht, zahlreiche Tatsachen zu sammeln und anzuführen, die von der armseligen Rolle zeugen, die Esperanto in den internationalen Beziehungen spielt. Um sich hiervon zu überzeugen, reicht es, durch Europa zu fahren und festzustellen, daß es in allen größeren Städten Buchhandlungen gibt, deren Schaufenster Bücher und Zeitschriften in den Sprachen der großen nationalen Kulturen ausstellen. Wir würden aber meist vergeblich in denselben Städten Buchhandlungen suchen, in denen Bücher und Zeitschriften auf Esperanto zu kaufen sind.“²⁴ Daraus ergibt sich für Lanti, daß derzeit keine Voraussetzungen, außer idealistische, für die Beschäftigung mit Esperanto bestehen: die Sehnsucht, sich mit Menschen auf der ganzen Welt zu verbrüdern, die Lust, für die Sache der Zerschlagung der tausendjährigen Mauern, die die Völker teilen, zu arbeiten. Es sind also dieselben Motive, die Zamenhof zur Arbeit an der Sprache drängten. Trotz seiner linken politischen Ansichten ist sich Lanti hierüber im Klaren. Er nennt die Anationalisten übrigens „die natürlichen Nachfolger Zamenhofs“ und seine Idee die „eindeutige Konsequenz seiner [Zamenhofs] nebelhaften Vorstellung von der inneren Idee des Esperantismus“.²⁵

Lanti war der Meinung, daß die emsige und unsichtbare Arbeit Einzelner Grundlage des Fortschritts sei. Diese in fast allen Texten zum Ausdruck gebrachte Überzeugung ist auch in

einer anregenden Zukunftsvision aus dem Jahr 1935 enthalten: „Obwohl viele Tatsachen tagtäglich von der gegenseitigen Abhängigkeit aller Völker zeugen, erscheint es mir doch offensichtlich, daß die nationale (*nacieca*) Ideologie, die über die Gehirne fast aller Menschen der Gegenwart weitgehend gebietet, unvermeidlich in eine neue weltweite kriegerische Katastrophe führt. Gedenkt man, daß Kriege der Vergangenheit gewöhnlich immer ausgedehntere Staaten schufen, so kann man sagen, daß sie in gewisser Weise fortschrittlich waren; dementsprechend war der letzte Krieg nach diesem Verständnis rückschrittlich, da sie zum Entstehen einer größeren Zahl kleiner Nationen führte, die in wirtschaftlicher Hinsicht völlig lebensunfähig waren. Dadurch haben sich die Anlässe zu Auseinandersetzungen vermehrt. Der kommende Krieg, der jetzt vorbereitet wird, wird vermutlich einen anderen Charakter haben. Sein Ziel bzw. Vorwand wird nicht die Anerkennung der Unabhängigkeit kleiner Territorien sein. Zwischen den Völkern wird ein neues Gleichgewicht der Kräfte entstehen, die wahrscheinlich eine relativ lange Periode des Friedens sichert. Währenddessen werden die Verkehrsmittel immer mächtiger und schneller, Kontakte unter Menschen immer häufiger und leichter, immer augenfälliger wird der Bedarf an einer gemeinsamen Sprache. Esperanto wird

eine bedeutend größere Anhängerzahl erwerben. Die Literatur in dieser Sprache wird zu einem beachtenswerten Faktor der Weltkultur und man darf hoffen, daß in unserer Sprache einige Meisterwerke entstehen, von denen die Presse in allen Sprachen berichtet. Das wird mit Sicherheit vielen Menschen den Anstoß geben, Esperanto zu lernen, um diese Werke im Original lesen zu können. So entstehen die notwendigen Bedingungen, die unseren zur Zeit utopischen Gedanken erlauben, sich auszubreiten und zu einer tatsächlichen Kraft zu werden.

Mir liegt allerdings der Gedanke fern, daß die Entwicklung in Richtung auf einen anationalen Weltzustand unwiderruflich sei, so als wenn irgendeine geheimnisvolle Kraft die Sache führe. Unerläßlich ist unsere Pioniertätigkeit, damit der Anationalismus Wurzeln schlägt, wächst, und zu einer ideellen Kraft wird, die imstande ist, künftige Generationen zu inspirieren. Die Menschen werden verstehen müssen, daß Unterschiede der Haut- oder Augenfarbe, der Nasenform oder der Körperhöhe kein ausreichendes Motiv sind, sich notwendigerweise in Nationen mit streng gegen außen bewachten Grenzen abzugrenzen.²⁶ An anderer Stelle schrieb Lanti: „Esperanto ist der Baum, Anationalismus wird seine Frucht sein.“²⁷

Bibliographie

- ¹¹ Lanti, E.: *Leteroj de E. Lanti*, Paris 1940, S. 22
¹² Eugeno Lanti ist ein Esperanto-Pseudonym. Eigentlich hieß der Schöpfer des Anationalismus Eugène Adam.
¹³ Lanti, E.: *Leteroj...*, S. 240
¹⁴ ebenda, S. 235
¹⁵ ebenda, S. 241
¹⁶ ebenda, S. 257
¹⁷ ebenda, S. 254-255

- ¹⁸ ebenda, S. 247
¹⁹ ebenda, S. 161
²⁰ ebenda, S. 256
²¹ ebenda, S. 256
²² ebenda, S. 243
²³ ebenda, S. 251
²⁴ ebenda, S. 263
²⁵ ebenda, S. 261
²⁶ ebenda, S. 248
²⁷ ebenda, S. 258

Vi povas rigardi la tekstojn de flugfolioj kaj informaj broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino ĉe: <http://home.germany.net/101/121591/mfb/index.html>

paĝoj de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE)

La Socialisto

Kelkaj vortoj de nia prezidantino

Karaj gelegantoj!

Nun estas ja la respondoj de nia legantaro tie ĉi. Kontraŭe al la unua rond-demando last-januaire ni ricevis pli da jes-kartoj ol neaj. Tamen la nombro de la "mutaj", ne repondintaj estas ankoraŭ sufiĉe granda. Nia sinteno 1999, konsideri ilin kiel konsentante montriĝis prava. Nenia protesto venis. Nun ni faru la saman: Supozi, ke ankaŭ nun ili neŭtrale jesas. Sed tiun fojon ne ĉiuj "mutaj" gelegantoj povos ricevi la *Magazinon*.

Nia problemoj estas la baldaŭa altigo de la poŝtelspezoj. Ni devas kalkuli pli zorgeme ol antaŭe kaj pro tio ni povas sendi la *Magazinon* nur al tiuj membroj, kiuj pagis. Multaj jam faris tion en dankinda maniero. Por la aliaj, ni enmetas pagilon, kiu estas speco de dua balotpapero: Kiu faros la pagon deklaras sin preta por la *Magazino*. Eble ni faros esceptojn por publikaj institucioj, por oficoj de la partio, al kiuj ni deziras prezenti la *Magazinon*.

La ĉefa temo estas: La socialista Internacio devos re-esperantiĝi! Favori kurs-ojn en ĉiujn mediojn! La ASLE mem restas ĉiam en sia etoso, ankaŭ leĝe kiel asocio. La kasisto ja pagos entute por nia *Magazin*-legantaro. Almenaŭ tio validas por la nuna situacio. La sekvontan numeron niaj membroj ricevos de la LEA/G en la formo de la gazeto "MAGAZINO". Ni deziras al vi agrablan legadon! Ni revidos nin en la paĝoj por la "SOCIALISTO" en ĝi.

Ĝis relego!

Al la aliaj gelegantoj, al kiuj ni sendis la *Socialiston* senpage, ni diras tamen dankon por la akcepto de la malgranda gazeto. La konscio, ke vi almenaŭ iom sciis pri Esperanto kaj ties problemoj, valoris por ni la penadon. Bedaŭrinde la nova situacio ekonomia ne plu permesas daŭrigi tiun sintenon.

Herta Niessner
Prezidantino de ASLE

Einige Worte unserer Vorsitzenden

Liebe Leserschaft!

Nun liegen ja die Antworten unseres Leserpublikums vor uns. Im Gegensatz zur ersten Rundfrage im Jan. 1999

erhielten wir mehr "JA" als "NEIN"-Antworten. Dennoch ist die Zahl der "Stummen", der Nicht - Antworter noch ziemlich groß.

Unsere damalige Einstellung, sie als einverstanden zu erklären, erwies sich als richtig. Es gab keinerlei Protest. Nun tun wir dasselbe: vermuten, dass sie auch jetzt neutral zustimmen. Aber dieses Mal werden nicht alle "stummen" Leser und Leserinnen das *Magazino* bekommen können.

Unser Problem ist die baldige Erhöhung der Postgebühren. Wir müssen genauer kalkulieren als früher und können daher nur an jene Mitglieder das *Magazino* schicken, die bezahlt haben. Viele haben dies dankenswerter Weise schon getan. Für die anderen legen wir einen Erlagschein bei, der eine Art zweiter Stimmzettel ist: Wer die Zahlung leistet erklärt sich bereit für das *Magazino*. Vielleicht machen wir Ausnahmen für öffentliche Institutionen und Parteidienststellen, denen wir das *Magazino* noch vorstellen wollen.

Das Hauptthema ist: Die sozialistische Internationale muss sich wieder Esperanto zuwenden, muss Kurse begünstigen in allen Medien! Die ASLE bleibt in ihrer Wesensart und auch vereins-technisch in ihrem jetzigen Zustand. Der Kassier bezahlt ja insgesamt für unsere *Magazino*-Leserschaft. Zumindest gilt dies so lange, als die jetzige Situ-

ation besteht. Die nächste Nummer erhalten unsere Mitglieder schon von LEA/G in Form des *Magazino*. Wir wünschen Ihnen angenehmes Lesen! Wir sehen uns wieder in den Seiten für den "Socialisto" darin.

"Auf Wiederlesen!"

Den anderen Lesern, denen wir den *Socialisto* kostenlos schickten, danken wir immerhin für die Annahme der kleinen Zeitung. Das Bewusstsein, dass Sie wenigstens etwas über Esperanto und dessen Probleme erfahren haben, ist uns die Mühe wert gewesen. Leider erlaubt es die wirtschaftliche Lage nicht mehr, diese Haltung fortzusetzen.

Herta Niessner
Vorsitzende der ASLE

Unsere nächsten Veranstaltungen:

Sommertreffpunkt in Wien:

Jeden Freitag von 17 – 19 Uhr im Esperanto Centro 1150, Fünfhausgasse 16-18, Stiege 2, Rufanlage. Thema: Konversation und Perfektion.

Bitte um baldige Zusendung des Mitgliedsbeitrages!

Kulturo kaj turismo

La Oka Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos de la 30-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro 2000 en urbo Blanes, provinco Girona, (Katalunio-Hispanio).

Pliajn informojn ĉe:

H.F.E.A.

Apartado 15027

ES-08080 Barcelona (Hispanio)

Tel: 937275021 k. 937253421

Faksilo: 937936511

Ret.: luis_serrano@mixmail.com

En la kultura kadro de ĉi tiu internacia evento Esperanta, okazos ILEI-ekzamenoj de elementa nivelo, gvidataj kaj sub la kontrolo de Carla de Lorenzi (membro de ILEI-estraro).

Vojaĝo al Nepalo

Januaro 2000. Antaŭ kelkaj tagoj mi revenis el Nepalo. Ĝoje mi povis konstati, ke tie la esperantistoj ne plu bezonas kaŝi sin.

Post alveno en Kattmandu mi aŭtobuse veturis al Pokkara, kiu situas 200 km distance de Kattmandu. Alian tagon, kiam mi promenis tra la urbo, portante la verdan stelon, min vidis du esperantistoj el Kattmandu kaj ili tuj informis telefonon la samideanojn en la ĉefurbo de Nepalo. Tiamaniere mi povis havi bonan kontakton kaj decidis resti du semajnojn en Kattmandu.

Mi povas komuniki pri tre familia akcepto fare de la nepalaj esperantistoj. Siatempe ili aktivis per varbado por la

3-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. La varbado sukcesis kaj meze de januaro jam aliĝis naŭ esperantistoj el Japanio, ok el Svedio, sep italaj, ses hindaj samideanoj, kvin el Finnlando, tri Koreanoj kaj tri Hungarianoj. Krome intencis partopreni esperantistoj el Belgio, Norvegio, Germanio, USONO kaj Argentino. Oni vidas, ke la Nepal-esperantistoj tute ne estas forgesataj en la Esperantomondo. Ili jam planas, ke la venonta kongreso okazu en la jaro 2002.

Nepalo, kie la montoj tuŝas la ĉielon, estas atingebla de Eŭropo post ĉ. 12-hora flugo.

Hans Jankowski

Du gravaj libroj

Antaŭ nelonge aperis du gravaj libroj en prestiĝa lingvistika eldonejo, ambaŭ verkitaj de esperantistoj/interlingvistoj kaj de granda valoro por lingvo-science kaj lingve interesitaj homoj, ĉar ili liveras al ni bonegajn argumentojn:

1. D-ro habil. Max Hans-Jürgen Mattusch analizis la tutmondan lingvo-situacion, la komunikproblemojn kaj evoluojn, kun aparta konsidero de la europa lingvo-problemo. Li ofte tre lerte mencias la ideon pri planlingvo ĝenerale, kaj aparte Esperanton. Al tiu temo estas dediĉita eĉ tuta ĉapitro.

En *Esperanto aktuell* 7/99 aperis ampleksa recenzo pri la libro:

Max Hans-Jürgen Mattusch (1999): *Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik*. Frankfurt/Main: Peter Lang, 321 p. ISBN 3-631-30587-7. 89 DM

2. Pri la habilitiga disertacio de D-rino Sabine Fiedler mi sufiĉe skribis en la numeroj de *Esperanto aktuell* (aparte: 3/1999). Nun la laboraĵo aperis kiel libro, kiu entenas multege da materialo, i.a. pri la kulturspecifaj lingvaj esprimiloj de Esperanto:

Sabine Fiedler (1999): *Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto*. Frankfurt/Main: Peter Lang, 444 p. ISBN 3-631-34088-5, 98 DM

Ambaŭ libroj bedaŭrinde estas multekostaj. Sed tio ne estas evitebla ĉe faklibroj kun malgranda eldonkvanto. Aĉetu la librojn por ilin legi kaj montri al interesigeblaj skeptikuloj. Ĉiu librovendejo akceptos viajn mendojn.

[laŭ retpoŝta komuniko de]
D. Blanke, blanke.gil@snafu.de

Financraporto por la jaro 1999

Enspezoj	DM	Elspezoj	DM
Bonhavaĵo el 1998	460,99	Organo <i>Magazino</i>	786,75
Kotizoj kaj donacoj	1705,33	Ĝirokonto-kostoj	75,33
Enkaso de kotizoj por SAT	340,-	Kotizo por LEA-Komitato	30,-
Pago de Vaatz por reprodukto de <i>Magazino</i>	16,20	Repago al SAT – Peranto-kostoj	171,83
		Subteno de SAT por Varbado	100,-
		Administrataj kostoj	35,63
		Kotizoj al SAT	340,-
Sumoj:	2522,52		1525,11
Nova bonhavaĵo:			997,41
	2522,52		2522,52

Dortmund, 2000.01.15

Subskribis originalon:

Jiri Proskovec, Hans Jankowski, M. Stephan,
Albert F. Stephan

novaĵoj

1a de majo

Ankaŭ ĉi-jare kvin membroj de Maldekstra Forumo aranĝis informstandon ĉe la majfestoj sur Mariannenplatz, kiun organizis PDS kaj Verduloj. Oni disdonis flugfoliojn, vendis broŝurojn. Eĉ du *Magazinoj* estis venditaj. (GM)

Bicikla manifestacio en Berlino

Sep berlinaj esperantistoj kune partoprenis la grandan biciklan manifestacion de 2000-06-04. Ili kaj aliaj poste kunagis ĉe stando de GEJ ĉe la media festo sur Unter den Linden. (GM)

«Tutmonde» ĉesos aktivi

La ĵus aperinta n-ro 8 de *Kune*, la organo de TUTMONDE Pacifista Movado, anoncas, ke tiu asocio post pli ol 15 jaroj ĉesigos sian agadon, unuavice pro maljuniĝo de la aktivuloj kaj manko de financaj rimedoj. (AS)

Dissenda listo

Nun diskutata en la LEA/G-estraro estas interreta dissendolisto por membroj, simpatiantoj kaj aliaj maldekstraj/progresivaj esperantistoj en la germanlingvaj regionoj. Laŭ la imago de Gary Mickle ĝi povus esti «paralela organo» de la Asocio flanke de la *Magazino*, kaj ankaŭ provizi redakcian materialon al tiu. (GM)

Dudek jarojn post Raŭmo

Dudek jarojn post Raŭmo: Ĉu ni diras «ion kulture originalan kaj internacie valoran»? Tiel nomiĝas seminario okazonta en Helsinko la 22an de julio 2000 kadre de la Kultura Esperanto-Festivalo. En informo sendita al soc.culture.esperanto, J. Lindstedt konstata: «La fundamenta demando estas do: ĉu la Esperanta kulturo devus signifi ion ankaŭ por la ekstera mondo, aŭ ĉu sufiĉas, ke ĝi estas grava por ni mem? Ĉu ni kulturu nur nin mem, aŭ ĉu ni posedas valorojn prezentindajn al eksteruloj? Kio estas tiu originala valorajo, kun kiu ni alproksimiĝu la mondon?» (J. Lindstedt / SCE)

Enketo pri eŭropanoj kaj lingvoj

eltiraĵoj (tradukitaj de GM el la angla) el Raporto 52 de Eŭrobarometro: *Publika Opinio en la Eŭropa Unio* (eldonita de la Eŭropa Komisiono – Ĝenerala Direkcio de Edukado kaj Kulturo), alirebla ĉe <http://europa.eu.int/comm/dg10/epo/>


6. Eŭropanoj kaj lingvoj

En la lasta ĉapitro de ĉi tiu raporto ni rigardas la rezultojn de kelkaj Eŭrobarometraj demandoj pri la lingvoj, kiujn EU-civitanoj parolas, konas kaj konsideras plej utilaj.

6.1. La gepatra lingvo

Kiam ni pripensas la lingvon, kiun EU-civitanoj konsideras sia gepatra lingvo, tiu ne nepre devas esti la oficiala lingvo de ilia loĝlando. Evidente, estas kelkaj ŝtatoj-membroj de la EU kun pli ol unu oficiala lingvo. Estas ankaŭ kelkaj landoj, en kiuj homoj konsideras *iun regionan lingvon sia gepatra lingvo*. La libereco labori kaj studi en alia ŝtato-membro signifas, ke en ĉiu lando ni trovas iujn «eksterlandajn» EU-civitanojn, kies gepatra lingvo estas ne-EU-lingvo parolata en ilia devenlando.

Procentaĵo de personoj kapablaj partopreni interparolon en alia lingvo ol la gepatra



[...]

6.2. Scio de aliaj lingvoj


Preskaŭ duono de EU-civitanoj kapablas partopreni interparolon en alia lingvo ol sia gepatra lingvo*. Kiel la sekvonta grafikaĵo montras, ekzistas larĝa variado inter la ŝtatoj-membroj. En Luksemburgo preskaŭ ĉiu parolas alian lingvon sufiĉe bone por interparoli. Tio validas ankaŭ pri pli ol 9 el 10 homoj vivantaj en Nederlando, kaj pri pli ol 8 el 10 homoj vivantaj en Danlando kaj Svedio. Homoj en Britio kaj Irlando malplej verŝajne parolas alian lingvon. En Irlando, la proporcio, kiu parolas alian lingvon, estas pli alta ol en Britio, ĉar estas multe da parolantoj de la irlanda (kaj se la irlanda estas ilia gepatra lingvo, ili preskaŭ ĉiuj scias ankaŭ la anglan).

* Oni demandis al enketatoj: «Kiujn lingvojn vi kapablas paroli sufiĉe bone por partopreni interparolon, krom via gepatra lingvo?» Oni kalkulas la procentaĵon en ĉiu lando, kiu parolas alian lingvon, subtrahante de la tuto la procentaĵon de 'ne scias'-respondoj.

Inter la diversaj sociaj-demografiaj grupoj, la proporcio de povantoj partopreni interparolon en lingvo alia ol la gepatra varias inter 76% de studentoj kaj 20% de personoj, kiuj forlasis la lernejon 15-jaraj aŭ pli junaj.

La angla estas la plej vaste «parolata» lingvo en la EU. Kiel la ĉi-sekva grafikaĵo montras, preskaŭ duono de la EU-civitanoj parolas ĝin. Ĝi estas la gepatra lingvo de 16% de la EU-loĝantaro; pliaj 31% parolas ĝin sufiĉe bone por partopreni interparolon. Aparte de la angla, la rangordo de la lingvoj pli aŭ malpli sekvas la rangordon de la enloĝantoj. Tiel do ni trovas, ke la germana estas la gepatra lingvo de 24% de EU-civitanoj kaj 8% de EU-civitanoj parolas ĝin sufiĉe bone kiel «duan» lingvon. La francan parolas 16% de la EU-loĝantaro, el kiuj 16% estas denaskaj parolantoj. La Itala estas la kvara lingvo laŭ disvastigiteco – ĝi kalkulas tiom da denaskaj parolantoj kiom la franca, dum la proporcio de nedenaskaj parolantoj estas signife pli malgranda (2%). 14% de la EU-loĝantaro parolas la hispanan (10% denaske kaj 4% kiel alian lingvon).

Lingvoj kaj civitanoj de la EU



Procentaĵo povanta paroli alian lingvon ol la gepatra sufiĉe bone por partopreni interparolon (EU15)	
Socia-demografia grupo	%
Studentoj	76
Edukitaĵ ĝis la aĝo de 20 jaroj aŭ pli	70
Manaĝistoj	69
15- ĝis 24-jaraj	62
Dungitoj	56
25- ĝis 39-jaraj	52
Memstare laborantaj	48
Viroj	46
Averaĝo de EU15	44
Edukitaĵ ĝis la aĝo de 16-19 jaroj	42
Virinoj	42
40- ĝis 54-jaraj	39
Senlaboraj	39
Manlaboristoj	37
55-jaraj kaj pli aĝaj	31
Dommastr(in)oj	30
Pensiigintaj	28
Edukitaĵ ĝis la aĝo de 15 jaroj aŭ malpli	20

novajoj

La Verbo

En Pollando ne nur reaperis dum la lastaj monatoj la longe perdita neŭtrala junulara asocio, sed ankaŭ estiĝas iniciatoj celantaj kunligi kaj varbi Esperanto-interesitojn el la alternativa-punka-liberecana medio.

Unu el ili estas la gazeto *La Verbo*, kies unua numero aperis antaŭnelonge. Ĝi estas preskaŭ tute pollingva, sed celas iĝi dulingva jam ekde la venonta numero. Kiel la enkonduka artikolo konstata, «la interesiĝo pri Esperanto en la sceno pograde kreskas, sed tio estas izolita fenomeno pro la totala manko de informoj pri Esperanto. Tial ankaŭ *La Verbo* estas unu el la gazetetoj (krom *Die Leer* el Plock kaj *Never B-29* el Mielec) inklinitaj trakti tiun demandaron.»

«Internacia lingvo faciligus ankaŭ la kontakton kun punkoj, liberecanoj, verduloj, feministinoj tutmonde – ĉiu povus interkompreniĝi sen peniga lernado de aliaj lingvoj.» Invitataj kunredakti estas bandoj, produktantoj, gazetetoj, aŭtonomaj grupoj, «por ke aliaj alternativuloj de diversaj mondopartoj povu konatiĝi kun la realaĵoj de nia landa sceno.»

La unua numero de *La Verbo* enhavas i.a. artikolojn pri persekutado de anarkiistoj en Italio, la situacio de afganaj virinoj, aplikado kaj baza gramatiko de Esperanto, agado por bestaj rajtoj kaj kontraŭ cirkoj, anarki-feminismo, senmona interŝanĝo.

Kontakto ĉe Łukasz, P.O.Box 239, PL-34120 Andrychów.

Esperanta l'Banko de Adresoj estas iniciato de tri gazetetoj, kiuj klopodas krei komunikadon de individuoj, bandoj, ekologiaj, kontraŭfasiŝmaj, liberecanaj k.a. grupoj, alternativaj firmaoj, kiuj volas interkompreniĝi per Esperanto. Oni volas eldoni daŭre aktualigatan adresoliston. Kontakto ĉe la adreso de *La Verbo*, ankaŭ ĉe *Never B-29*, Arek Jeleń, ul. Niepodległości 8/2, PL-39-300 Mielec kaj ĉe *Die Leer zine*, Tom Krzemieniewski, ul. Polnocna 30/34, PL-09-402 Plock. (GM)

La sekvonta tabelo listigas la 3 plej vaste parolatajn lingvojn, krom la gepatra, en ĉiu ŝtato-membro. Ĝi emfazas la jenon:

- En ĉiuj neanglalingvaj landoj, krom Luksemburgo, la angla estas la plej vaste konata dua lingvo.
- En la anglalingvaj landoj, la franca estas la plej vaste konata dua lingvo.
- En landoj, en kiuj regionaj lingvoj estas parolataj, ni trovas la nacian lingvon listigita kiel 'fremda' lingvo (ekz. en Luksemburgo, Hispanio kaj Irlando).

[...]

6.3. Kiujn de «fremdajn» lingvojn estas plej utile scii?


Je la demando, kiujn du lingvojn la homoj konsideras plej utile scii, krom la gepatra lingvo*, ni trovas la anglan altgrade plej populara, sekvita de la franca, germana kaj hispana. Sumiĝite, la aliaj 7 oficialaj EU-lingvoj estas taksataj plej utilaj de nur 4% de la EU-loĝantaro.

Kiujn 2 lingvojn estas plej utile scii, krom via gepatra lingvo? (EU15)	%
angla	70
franca	37
germana	23
hispana	16
aliaj oficialaj EU-lingvoj	4
aliaj ne-EU-lingvoj	1
aliaj	2
ne scias	13

[...]

* Oni petis la homojn nomi du lingvojn por plimultiĝi la elekton de aliaj lingvoj ol la angla.

lingva angulo



Horizontale

- 1 sapei (7)
- 6 difina artikolo (2)
- 7 pelta manvarmigilo [radiko] (3)
- 9 politike potenca riĉulo (10)
- 10 hele malva [radiko] (3)
- 11 translingvigi filmon (5)
- 14 konjunkcio uzata lige kun komparativo (2)
- 15 antikva argila botelego (6)
- 19 falsi per almikso (8)
- 20 doktrino emfazanta la uzvaloron de aferoj (8)

Vertikale

- 2 koloro de la ĉielo [radiko] (3)
- 3 neevitebla, pereiga (6)
- 4 kunfaldebla ujo (4)
- 5 elglitigi nelikvan substancon (4)
- 7 postĝinteco (9)
- 8 gaje frenezeta (4)
- 9 tervojeto (4)
- 12 homo [sufikso] (2)
- 13 atribui (6)

- 16 karakterizi per paralelaj streketoj (4)
- 17 fulmofermilo (4)
- 18 pli longe, pli daŭre (3)

Lingvaj problemoj en la maldekstra gazetaro

el la artikolo *La reto kuntiriĝas – la interreto envolas Afrikon* de Tobias Michel en *SoZ – Sozialistische Zeitung* n-ro 10 de 2000-05-11, paĝo 16, rete: <http://members.aol.com/sozkoeln/sozrst/001016.htm>

Legokapabligo: Nur malplimulto de la afrika junularo frekventas ian lernejan instruadon. Por lerni legi kaj skribi ili ne devas povi funkciigi komputilon; nur la inverso estas ĝusta.

Pro tio, por la plej multaj bazlernejoj en Afriko ĉiutaga lerneja manĝo, kajeroj kaj skribiloj estus multe pli sencaj ol ret-aliro sponsorata el la industriaj landoj. Efektive, aro de afrikaj lernejoj estas jam ekipita per komputiloj kaj interreto – privataj lernejoj por la infanoj de la elitoj.

Lingvo: 80-90% de ĉiuj interretaj proponaĵoj estas en la angla, t.e. lingvo komprenata nur ĝuste de ĉiu deka homo en la mondo. 5% de la TTT-ejoj estas en la franca, ĝuste 2% en la hispana. Jam la germanaj umlaŭtoj necesigas artifikadon, ĉar ili mankas en la simpla ASCII-signaro. Des pli tiuj lingvoj estas malavantaĝataj, kiuj entute ne baziĝas sur la latina skribo.

La komerce motivita decido ĉe Microsoft, ke ĝi ne plu evoluigos programversiojn en la islanda, provokis protestan ŝtormon en la islanda registaro. Pri kutimaj uzulprogramoj en la afrikaj landaj lingvoj oni ĝis nun eĉ ne povis pensi.

AL LA LABORISTOJ DE ĈIUJ LANDOJ UNU LINGVON!

Migra Esperanto-ekspozicio pri historio pruntebla

La historio de la Esperanto-movado bedaŭrinde estas ĝenerale ne tre bone prilaborita. Tio ankaŭ koncernas la laboristan Esperanto-movadon. Por verki pri historiaj temoj necesas dokumentaj materialoj. Tro ofte ĝuste ili perdiĝas post organizaj ŝanĝoj ĉe organizaĵoj kaj, ankoraŭ pli ofte, post la morto de iamaj aktivuloj. Tion konsciante jam antaŭ sia morto la germana laborista esperantisto Eduard Weichmann donacis sian valoran kolekton de laboristmovadaj esperantoj al la "Fritz-Hüser Instituto pri germana kaj eksterlanda laborista literaturo" de la urbo Dortmund (Germanio). Tiu instituto kolektas materialojn ne nur pri literaturo sed pri ĉiuj aspektoj de la laborist-movada kulturo, ekz i.a. pri naturomikoj, liberpensuloj, radio-amatoroj, teatro-grupo, korusoj, k.s. Ĝi esploras pri tio, publikigas studojn, organizas prelegojn kaj pretigas migrajn ekspoziciojn. La instituto en siaj komfortaj arkivejoj kaj lego-ĉambroj disponas pri 31 000 libroj, pri pli ol 13 000 revuoj kaj 67 kontinuaj metroj da aktoj.

Esperanto ludas gravan rolon en la laboro de la instituto. Pro la donaco de Weichmann kaj de aliaj laboristaj esperantistoj ĝi posedas pli ol 700 librojn, revuojn el 28 landoj, krome la korespondaĵojn de Weichmann el 30 landoj, jarlibrojn, kongresdokumentojn, gazeteltondadojn, protokolojn, varbilojn, informilojn k.a.

Pri la gazeto-kolekto ekzistas aparta broŝuro. La instituto organizis du migrajn ekspoziciojn pri la historio de la laborista Esperanto-movado. La unuan en 1983 (aperis 16-paĝa katalogo). La duan ĝi malfermis kadre de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto en Valencio, dum julio en 1993. Por tiu ekspozicio eldoniĝis dulingva katalogo (germana kaj Esperanto), 133-paĝa, kun kontribuoj de Blanke, Lins, Naltenius, Prokovec kaj Weichmann. La katalogo haveblas ĉe UFA kaj la instituto.

La tuta multkolora ekspozicio konsistas el 24 plastaj tabuloj (90 x 100cm) kaj 10 kartonoj. Ili estas facile munteblaj sur portiloj aŭ pendigeblaj sur muroj. Haveblas aŝiŝoj. La ekspozicio, kiun pagis la urbo Dortmund, estas senpage pruntebla. Interesiĝantaj landoj aŭ regionaj asocioj, organizantoj de kongresoj kaj aliaj aranĝoj aŭ eĉ lokaj kluboj povas prunti ĝin senpage, sed devas zorgi pri transporto kaj asekuroj. La instituto, kiu komunikas en Esperanto, disponigos informfolion pri teknikaj detaloj.

Skribu al:

Fritz-Hüser Institut
Ostenhellweg 56 - 58
D-44135 DORTMUND
Germanio

Esperanto-mono mendebla

La broŝuro *Esperanto-mono* estas mendebla ĉe:

Litova Esperanto-Asocio
P.k. 167
LT-3000 Kaunas, Litovio.
Fakso: (370-7) 228 616
E-poŝto: litovastelo@takas.lt

Prezo:

por 1 ekz. 5 € (+ sendokostoj 1 €)
por 3 ekz. 10 € (+ sendokostoj 2 €)
por 10 ekz. 30 € (+ sendokostoj 4 €)

Pagoj:

al konto de Litova Esperanto-Asocio ĉe
UEA *litv-s*
en Germanio al UEA-konto ĉe Postbank
Köln 3182 91 509 (BLZ 370 100 50).

**Se vi trovos ruĝan krucon en
ĉi tiu kesto vi bedaŭrinde ĝis**



**nun ne pagis vian
kotizon, respektive vian (re)-
abonon por 2000.
Bv. ĝiri al Jiri
Proskovec,**

**Dortmund, k-to 9168-434
ĉe Postbank Essen
(BLZ 360 100 43) Dankon!**

La *LEA/G-Magazino* aperas ankaŭ
en interreta eldono, kiu inkluzivas
(kiam ĝi finfine atingas la reton)
grandan parton de la enhavo de la
papera eldono:

[http://home.germany.net/
101/121591/leag/](http://home.germany.net/101/121591/leag/)

Enhavo:

	<i>paĝo</i>
Ĉu LEA/G mortos? (Albert Stephan)	1
Asocioj de laboristaj esperantistoj ne estas en bonstata situacio (Albert Stephan)	3
Ni mobilizu la subjektivajn faktorojn (I. F. Bociort)	4
Ĉu etnofiliokritika sennaciismo (Gary Mickle)	6
Kiel mi serĉis mian identecon ĉe la etnistoj de la Fontan-skolo (Gary Mickle)	9
INFORMILA SEKCIo: – Broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino: <i>Esperantistische Weltbilder</i> (W. Usakiewicz) (2a parto)	11
<u>La Socialisto</u>	
Kelkaj vortoj de nia prezidantino	15
Einige Worte unserer Vorsitzenden	15
Unsere nächsten Veranstaltungen	16
Kulturo kaj turismo	16
Vojaĝo al Nepalo (Hans Jankowski)	17
Du gravaj libroj (D. Blanke)	17
Financraporto por la jaro 1999	18
NOVAJOJ	18
Enketo pri eŭropanoj kaj lingvoj (Eŭropa Komisiono)	19
NOVAJOJ	21
LINGVA ANGULO	22
LINGVAJ PROBLEMOJ EN LA MALDEKSTRA GAZETARO	22
Al la laboristoj de ĉiuj landoj unu lingvo (Fritz-Hüser-Institut)	23